

Esperanto – amikoj tutmonde

Germana Esperanto-Kongreso
Deutscher Esperanto-Kongress



GEK 100

1906–2023

Braunschweig
26-a ĝis 29-a de majo 2023

► Postkongreso (ĉefe turisma): ◀
ĝis la 2-a de junio 2023



Enhavo

La kongresurbo Braunschweig	3
Salutvortoj	4
Organizaj atentigoj	8
Tema programo	10
Prelegoj Vorträge	10
Diskutoj, laborgrupoj	
Diskussionen, Arbeitsgruppen	20
Trejnadoj Training	20
Diversaĵoj Sonstiges	23
Horaro	23
Kultura programo	30
Ekskursoj	32
Urbogvidado Stadtführung	32
Ekskursoj Ausflüge	33
Specialaj ekskursoj	
Spezielle Ausflüge	36
KEKSO	38
Mezaĝula programo	39
Libroservo	40
Sprachkurs für Anfänger	40
Listo de partoprenantoj	41
Eŭropa Esperanto-Kongreso 2024	47
Listo de la	
Germanaj Esperanto-Kongresoj	48

Aliĝu al nia

telegramgrupo „GEK 2023 en Braunschweig“!

En la grupo eblas diskuti pri la kongreso,
starigi demandojn pri programeroj kaj
ricevi anoncojn de la teamo.

Skanu la bildkodon ...



... aŭ vizitu ► <https://gek.telegramo.org/>
per via retumilo.

Publikaj programeroj

Kelkaj programeroj de la kongreso estas
malfermitaj al la publiko kaj senpage alireblaj.
En la horaro ili estas markitaj per **verda fono**.

- germanlingva prelego
- la lingvokurso
- la vesperaj koncertoj



Ĝeneralaj informoj (laŭ ► eo.wikipedia.org/wiki/Braunschweig)

Braunschweig [braŭnŝvajk] estas urbo kun proksimume 249.000 loĝantoj en la sudoriento de la germana federacia lando Malsupra Saksio (Niedersachsen). Ĝi estas centro de la regiono oriento de Hanovro kaj post ĝi dua urbo laŭ grandeco de Malsupra Saksio.

La skribita historio de Braunschweig komenciĝis en la 8-a jarcento. Ĝi apartenis kiel unu el la plej gravaj urboj al la komerca ligo Hanso en la mezepoko, sed ne povis daŭrigi tiun ĉi gravecon. Unu kaŭzo estis la geografia situo inter Hanovro kaj Berlino, kiuj ambaŭ kreskis pli rapide. Dum la lastaj pli ol cent jaroj Braunschweig estis industria centro. Hodiaŭ la sciencoj kaj la edukado estas pli elstaraj.

La urboj Braunschweig, Wolfsburg kaj Salzgitter kunlaboras komunume kaj formas unu el la regionaj centroj de Malsupra Saksio.

Faktoj

Areo: 192,09 km²

Loĝantoj: 245.840 (en 2008)

Loĝdenso: 1.291 loĝantoj/km²

Situo: 52° 16' N, 10° 31' E

Averaĝa alteco: 70 metroj super la marnivelo

Plej granda alteco: 111 metroj super la marnivelo

Plej malgranda alteco: 64 metroj super la marnivelo

Horzono: GMT+1h (+2h de aprilo ĝis oktobro)

Esperanto en Braunschweig

Dum la jaro 1906 Karl Wallon fondis Esperanto-grupon en la urbo. Samjare okazis la 1-a Germana Esperanto-Kongreso surloke; denove la 50-a (1972) kaj la 84-a GEK (2006) estis tie ĉi. La jubilea 100-a Germana Esperanto-Kongreso en printempo 2023 nun denove okazas en la urbo (► www.esperanto.de/eo/gek2023). Krome almenaŭ en la jardeko antaŭ la unua mondmilito la eldonejo Heckner en la apuda urbo Wolfenbüttel eldonis multajn renomajn librojn en Esperanto.

Pri Braunschweig (parte laŭ *Esperanto aktuell* 2022-4, de Andreas Emmerich)

... Bedaŭrinde la historia urbocentro estis detruiĝinta dum la Dua Mondmilito; tamen restas gravaj vidindaĵoj, precipe la katedralo Sankta Blazio kaj la kastelo Dankwarderode.



La „tradici-insulo“ ĉirkaŭ la katedralo konsistas el la kastela placo kun la simbolo de Brunsvigo, tio estas la brunsviga Leono. La originala skulpturo el la 12-a jarcento troviĝas nun en la muzeo por protekti ĝin; sur la placo oni vidas kopion. La Leono estas la unua grandskulpturo sen religia rilato norde de la Alpoj.

Ĉirkaŭ la Leono situas Landa Muzeo kaj pluraj domoj de gravaj familioj de la mezepoko, ekzemple de la familioj Huneborstel kaj Veltheim. Sudokcidente

malantaŭ la katedralo troviĝas pliaj. Similaj „insuloj“ estas Malnova Foiro kun Malnova Urbodomo, kaj Brasika Foiro kun tre vidindaj konstruaĵoj. Nepre vidindaj estas ankaŭ pluraj preĝejoj, precipe Sankta Magno, Sankta Martino kaj Sankta Miĥaelo.





Herzlichen Glückwunsch zum 100. (Kongress-) Jubiläum! Es freut mich sehr, dass sich der Deutsche Esperanto-Bund e.V. in Niedersachsen wohl fühlt und nach dem 99. Bundeskongress in Oldenburg auch den Jubiläumskongress in unserem schönen Bundesland begehen wird.

Das gewählte Motto „Freunde in aller Welt“ passt gut für das globale Wirken der Esperanto-Gemeinschaft.

Seit über einem Jahr tobt ein Krieg in Europa. Ein brutaler Angriffskrieg, in dem die Ukraine nicht nur ihren Frieden, ihre Freiheit und Werte, sondern auch unsere verteidigt. Dieser Krieg ist im globalen Kontext ein sehr prägnantes, aber nicht das einzige Beispiel dafür, dass die Weltordnung, wie wir sie in den vergangenen drei Jahrzehnten kennenlernen durften, im Umbruch ist.

In unruhigen Zeiten ist es unerlässlich, dass Staaten grenzüberschreitend mit einer Stimme sprechen, einer gerechten und humanitären Stimme, die zusammenführt und nicht spaltet und die Interessen aller Menschen und nicht einiger Weniger vertritt.

Mit einer Stimme zu sprechen war auch das ehrwürdige Ziel der Esperantisten aus Deutschland, Österreich und der Schweiz, die sich 1906 in Braunschweig zur damals noch „Deutschsprachigen Esperantisten-Gesellschaft“ zusammenschlossen.

Sie standen in der unmittelbaren Tradition von Ludwik Lejzer Zamenhof, der 1887 in Warschau die Grundlagen einer neuen völkerverbindenden Plansprache vorgestellt hat. Eine Zweitsprache, die nicht nur einfach und nahezu spielend erlernt werden kann, sondern schon heute für Menschen dafür sorgt, dass sie über Sprachgrenzen hinweg problemlos und auf Augenhöhe miteinander kommunizieren können.

Koran gratulon okaze de la 100-a (kongresa) jubileo! Tre ĝojigas min, ke la Germana Esperanto-Asocio sin sentas bone en Malsupra Saksio kaj post sia 99-a en Oldenburg nun ankaŭ sian jubilean kongreson organizas en nia bela federacia lando.

La elektita temo „amikoj tutmonde“ bone konvenas por la tutmonda agado de la Esperanto-komunumo.

De pli ol unu jaro furiozas milito en Eŭropo. Brutala agresa milito, en kiu Ukrainio defendas ne nur siajn pacon, liberecon kaj valorojn, sed ankaŭ la niajn. Tiu milito estas ege trafa, sed ne la sola ekzemplo montranta ke la monda ordo, kun kiu ni rajtis konatiĝi en la pasintaj tri jardekoj, estas ŝanĝiganta.

En maltrankvilaj tempoj necesas, ke ŝtatoj translime parolu per unu voĉo, justa kaj humaneca voĉo, kiu kunigas kaj ne splitas, kaj kiu reprezentas la interesojn de ĉiuj homoj kaj ne nur malmultaj.

Paroli per unu voĉo ankaŭ estis la honorinda celo de la esperantistoj el Germanio, Aŭstrio kaj Svislando, kiuj 1906 en Braunschweig kuniĝis en la – tiam ankoraŭ – „Germana Esperantista Societo“.

Ili troviĝis en la senpera tradicio de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu 1887 en Varsovio estis prezentinta la bazojn de nova planlingvo interliganta la popolojn. Dua lingvo, kiu ne nur estas lernebla facile preskaŭ kiel ludo, sed jam hodiaŭ

Es freut mich ganz besonders, dass sich beim 100. Bundeskongress in Braunschweig ein Kreis schließt und neben dem fachlichen Austausch auch das Miteinander viel Raum einnehmen wird. Denn genau dafür steht Esperanto. Für Ihren Kongress wünsche ich Ihnen viel Erfolg!

Hannover, im April 2023

Stephan Weil
Ministerpräsident von Niedersachsen

ebligas homojn senprobleme kaj samnivele komuniki inter si trans lingvaj limojn.

Mi aparte ĝojas, ke per la 100-a federacia kongreso en Braunschweig fermiĝas cirklo kaj apud la faka interŝanĝo ankaŭ la kunestado okupos multe da spaco. Ĉar ĝuste tio estas esenca trajto de Esperanto. Por via kongreso mi deziras al vi multan sukceson!

Hanovro, aprilo 2023

Stephan Weil
Ĉefministro de Malsupra Saksio



Ich freue mich sehr, dass sich der Deutsche Esperanto-Bund (D.E.B.) entschlossen hat, seinen 100. Kongress nach Braunschweig zu vergeben. Zu diesem Jubiläum übermittle ich den über 200 Teilnehmerinnen und Teilnehmern aus dem In- und Ausland im Namen der Stadt Braunschweig, aber auch persönlich, meine herzlichen Glückwünsche.

Zugleich kehrt der D.E.B. mit der Wahl seines Kongressortes zu seinen Wurzeln zurück: Wurde doch – nachdem sich schon 1904 einige Enthusiasten zur ersten Braunschweiger Esperanto-Gruppe zusammengeschlossen hatten – im Jahr 1906 in unserer Stadt auf dem 1. Deutschen Esperanto-Kongress die damalige „Deutsche Esperantisten-Gesellschaft“ gegründet.

Dass der 100. Esperanto-Kongress unter dem Motto „Freunde in aller Welt“ stattfindet, charakterisiert nicht nur das Wirken der Esperanto-Bewegung in unserer heutigen Welt. Es passt auch hervorragend zu unserem Anspruch als tolerante, internationale Stadt. Damit meine ich nicht nur die engen Kontakte zu unseren zehn Partner- und Freundschaftsstädten auf vier Kontinenten, sondern auch die wissenschaftlichen, wirtschaftlichen und kulturellen Verbindungen, die wir in zahlreiche weitere Staaten und zu Kommunen rund um den Globus pflegen.

In Anbetracht des völkerrechtswidrigen Angriffskrieges gegen die Ukraine und zahlreicher militärischer Auseinandersetzungen weltweit ist es wichtig, dass die Menschen für ein friedliches Zusammenleben über alle Grenzen hinweg eine Sprache sprechen. Auch im Hinblick auf die zunehmende Globalisierung ist eine Sprache hilfreich, die eine Begegnung auf Augenhöhe ermöglicht und damit einen wertvollen und wichtigen Beitrag für das Vertrauen zwischen den Staaten leistet.

Mi tre ĝojas, ke la Germana Esperanto-Asocio (GEA) decidis lokigi sian 100-an kongreson en Braunschweig. Okaze de tiu jubileo mi sendas al la pli ol 200 partoprenantoj kaj partoprenantoj el en- kaj eksterlando nome de la urbo Braunschweig, sed ankaŭ persone, miajn korajn gratulojn.

Samtempe GEA per la elekto de sia kongresloko revenas al siaj radikoj: post kiam jam en 1904 kelkaj entuziasmoj estis kuniĝintaj kiel unua Esperanto-grupo en Braunschweig, en la jaro 1906 dum la unua Germana Esperanto-Kongreso fondiĝis la tiam „Germana Esperantista Societo“.

La fakto, ke la 100-a Germana Esperanto-Kongreso havas la temon „amikoj tutmonde“, karakterizas ne nur la agadon de la Esperantomovado en nia hodiaŭa mondo. Ĝi ankaŭ tre bone konvenas al nia pretendo esti tolerema, internacia urbo. Per tio mi celas ne nur la stretajn kontaktojn kun niaj dek partneraj kaj amikaj urboj en kvar kontinentoj, sed ankaŭ la sciencajn, ekonomiajn kaj kulturajn ligojn, kiujn ni havas kun multaj aliaj ŝtatoj kaj komunumoj ĉirkaŭ la terglobo.

Konsiderante la kontraŭjuran agresan militon kontraŭ Ukrainio kaj multajn aliajn militajn disputojn en la tuta mondo gravas, ke por paca kunestado la homoj translime parolu unu lingvon. Ankaŭ rilate al la kreskanta tutmondiĝo helpas lingvo, kiu permesas renkontiĝi je la sama nivelo kaj tiamaniere faras valoran kaj gravan kontribuon al konfido inter la ŝtatoj.

Von diesem idealistischen Gedanken war auch Ludwik Lejzer Zamenhof geleitet, als er 1887 die Grundlagen des Esperanto vorstellte: Er war der Überzeugung, dass diese internationale Sprache letztlich auch ein Schlüssel zum Weltfrieden wäre. Die Grundidee, mit einer Stimme zu sprechen, hat bis heute nichts von ihrer Bedeutung verloren.

Daher überrascht es nicht, dass das Interesse, Esperanto zu erlernen, auch in Deutschland in den vergangenen Jahren wieder deutlich gewachsen ist. Weltweit haben in letzter Zeit über Internet-Sprachlerndienste mehr als zwei Millionen Menschen die Sprache gelernt – ein Trend, der offensichtlich anhält und optimistisch stimmt.

Umso mehr wünsche ich dem 100. Kongress des Deutschen Esperanto-Bundes einen erfolgreichen Verlauf. Er wird – davon bin ich überzeugt – wertvolle neue Ideen und innovative Impulse für die weitere Verbreitung der internationalen Sprache liefern, bestehende Netzwerke vertiefen und neue Freundschaften entstehen lassen.

Dr. Thorsten Kornblum
Oberbürgermeister

Tiu idealisma penso gvidis ankaŭ Ludovikon Lejzer Zamenhof, kiam li en 1887 prezentis la bazojn de Esperanto. Li estis konvinkita, ke ĉi tiu internacia lingvo finfine ankaŭ estu ŝlosilo al monda paco. La baza ideo – paroli per unu voĉo – ĝis hodiaŭ perdis nenion de sia aktualeco.

Tial ne mirigas, ke la intereso eklerni Esperanton ankaŭ en Germanio en la pasintaj jaroj denove videble kreskis. En la tuta mondo lastatempe per interretaj kursoj pli ol du milionoj da homoj lernis la lingvon – tendenco, kiu daŭras kaj igas optimisma.

Des pli mi deziras sukceson al la 100-a kongreso de Germana Esperanto-Asocio. Mi estas konvinkita, ke ĝi alportos valorajn novajn ideojn kaj novigajn impulsojn por la daŭra disvastigo de la Internacia Lingvo, ke ĝi profundigos ekzistantajn kontaktretojn kaj estigos novajn amikecojn.

Dr. Thorsten Kornblum
Ĉefurbestro



Karaj kaj estimataj Jubile-kongresanoj de la Germana Esperanto-Asocio,

Pasintjare mi sendis al vi mesaĝon por la Kongreslibro kun la espero, ke mi mem povos ĉeesti kaj vive partopreni en signifa renkontiĝo kiu inkluzivis ankaŭ la Landan Asocion de Nederlando. Malhelpis la cirkonstancoj, kvankam mi sukcesis prezenti per video pri la grava temo daŭripovo. Ĉi-jare mi esperas kompensi mian foreston per ĉeesta saluto kaj aktiva partopreno!

En 1906 kiam en Braunschweig (Brunsvigo) okazis la unua kongreso de la Germana Esperanto-Asocio, tiu iniciato venis nur unu jaron post la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro, 1905. Tiu unua germana kongreso efektive konfirmis la pretecon de la germana popolo signife kontribui al la Esperanto-movado, inkluzive al la naskiĝonta UEA. Jam germanoj konsiderinde helpis la favorigon de Esperanto super la malpopolariĝanta Volapük, kaj inter aliaj servoj al la movado germana prusiano W.H.Trompeter savis la gazeton *La Esperantisto* per pago de ĝiaj eldonkostoj kaj salajro al D-ro Zamenhof mem.

Brunsvigo tiam havis signifan rolon en la lando kiun nur poste transprenos ankaŭ Hanovro kaj Berlino. Jam en Brunsvigo tiujare lanĉiĝis la ideo ke GEA invitu la mondkongreson al sia lando, kaj tio efektive okazis en Dresdeno post nur du jaroj, en 1908, kun partopreno de 1500 kongresanoj. Alia historia momento, ĉar kiel indikis D-ro Zamenhof mem en la malfermo de tiu „Kvara Esperantista Kongreso“: „Nun la unuan fojon nia kongreso aperas sub la oficiala sankcio de regnestro kaj registaro.“ Li aludis al la Saksa registaro, la Dresdena urbestro, kaj ĉefe al „Lia Regnestra Moŝto la Reĝo Frederiko Aŭgusto de Saksujo“. Tio preparis la vojon por ke fariĝu honora prezidanto de la kvina kongreso en Barcelono la postan jaron la Reĝo de la tuta hispana popolo, Alfonso la 13-a.

Kvankam pasis jaroj sen kongreso de GEA pro milito kaj politikaj kaŭzoj, ni tamen fine alvenis al la centa, Jubilea Kongreso. Tio donas al ni la okazon retrorigardi al la atingoj de la germana Esperanto-movado, gratuli kaj danki pro via unika kontribuo al la disvastigo kaj prestiĝo de nia lingvo, kaj plani por la venonta etapo en nia daŭripova progreso. Kien? Al la pli vasta utiligo de nia plene elprovita komunikilo, preta por la defioj de mondo ŝanĝita de sankrizo kaj ŝanĝota pro la subita antaŭensalto en la evoluo de Artefarita Intelektio.

Rimarku ke multaj el la ĉi-kongresaj prezentaĵoj orientiĝas al ĉefa devizo de la Jubilea Kongreso:

Esperanto – amikoj tutmonde. Gravos ekzameni la rolon de Esperanto kaj esperantistoj en milito kaj post-militaj periodoj, kaj kiel strategie plani por nivelo de interpopola kompreniĝo kiu fine postulos ke registaroj ne plu antaŭenigu planojn por milita konfliktado kun aliaj nacioj, aŭ interne de nacio. Ĉu tio estu la fina vizio de UEA, la Esperanto-movado ĝenerale, kaj la germana movado specife? Dum jaroj sen mondmilito la popoloj esperis ke ni progresis, sed la nunaj cirkonstancoj montris ke tiu progreso, kun protekto de homaj rajtoj ĉie, ne nature okazos sen nia aktiva atento. Esperanto – amikoj tutmonde. En ĉi tiu kongreso ni kune pripensu la pli profundan signifon de tiu deklaro. Ĉu kvereloj en nia movado simple spegulas mondajn kverelojn, aŭ ĉu nia movado povas esti modelo por transkultura amikiĝo kiu nepercepteble sed konkrete rezultigos pli amikecan kaj malpli konflikteman mondon? Ni kune pensu kaj planu.

Duncan Charters
Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio



Karaj geamikoj,

bonvenon al la centa Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig! Antaŭ 117 jaroj ĉi tie fondiĝis la Germana Esperantista Societo, la unua provo kunigi adeptojn de la Internacia Lingvo en la germanlingvaj landoj (gravan rolon tiutempe ludis la sviso Jean Borel). Kelkajn jarojn poste – en 1909 – ĝi ŝanĝis sian nomon al Germana Esperanto-Asocio kaj limigis sian aktivecon al Germanio en la tiamaj limoj. Sekvis rapida progreso de la movado simile kiel en aliaj landoj, sed ankaŭ perdoj kaj interrompo de la laboro pro la unua mondmilito. Post la regajnoj en la 20-aj jaroj la Esperanto-agadon en Germanio haltigis la likvido de la laborista movado en 1933, la kompleta malpermeso en 1936 kaj la dua mondmilito, en kiu pereis multaj esperantistoj en- kaj eksterlande. Post majo 1945 unuaj klopodoj revivigi la kontaktojn montriĝis ĉie en la lando, sed baldaŭ ankaŭ la esperantistojn trafis la divido inter orienta kaj okcidenta Germanio. Komuna asocio reestiĝis nur post la reunuiĝo de la lando antaŭ nun pli ol 30 jaroj. La spertoj okcidente kaj oriente estis malsamaj. Hodiaŭ ni profitas de ambaŭ.

Centa kongreso estas okazo rememori pri tiu historio. Tion ni faros per pluraj programeroj. Mi mem iom foliumis en malnovaj revuoj. Impresis min la natura entuziasmo kaj optimismo de niaj antaŭuloj, kvazaŭ la „fina venko“ atendus nin post la venonta stratkurbiĝo. Hodiaŭ la Esperanto-movado pluekzistas en malsama mondo – tamen ne necese pli malfavora. Ekzemple homoj ĝenerale malpli ŝatas organiziĝi en asocioj aŭ iri al tradiciaj grupvesperoj, sed ankaŭ la esperantistoj profitas de la tutmondiĝo en la reto, de novaj translimaj komunikiloj kaj novaj lernmanieroj. Kaj – se ne malhelpas financaj, vizaj aŭ pandemiaj obstakloj – vojaĝado fariĝis pli facila. La novaj kondiĉoj ŝanĝas la aspekton

de la Esperanto-movado, kiu tamen ne perdas sian vigecon. Ĝi restas unika instrumento de interkultura komunikado kaj tiel donas al ni avantaĝon, pri kiuj multaj eĉ ne konscias. Ankaŭ pri tio ni aŭdos dum la kongreso.

Kunvenoj kiel la nia estas elementoj de Esperantujo: okazoj por resti kune dum kelkaj tagoj kaj praktiki la lingvon. Unuafoje tial ankaŭ GEA riskas plilongigi sian kongreson al tuta semajno. Nun – komence de majo – eblas konstati, ke ne nur venis rekorda nombro de aliĝoj por la 100-a GEK, sed multaj partoprenantoj ankaŭ restos por la plilongigaj tagoj. Prepari la tuton kostis multege da laboro. Multan dankon pro tio ĉefe al la Loka Kongresa Komitato, kiu jam duan fojon organizas la GEK.

Ni do kompletigu la unuan centon, rememoru pri la meritoj de niaj antaŭuloj kaj rekonsciiĝu pri la aktualeco de nia lingvo. Agrablan restaĵon en Braunschweig!

Ulrich Brandenburg

Prezidanto de Germana Esperanto-Asocio

Organizaj atentigoj

Kongresa adreso

Centra renkontejo kaj kongresa adreso estas la junulargastejo:

Jugendherberge Braunschweig
Wendenstraße 30
38100 Braunschweig
telefono: +49 531 8668850

Atentu: La pordo de la junulargastejo estas ŝlosita ekde 21:00. Loĝantoj de la junulargastejo povas eniri kaj eliri per sia ŝlosilkarto, aliaj bezonas la helpon de junulargastejaj loĝantoj.

Organiza teamo

La organiza teamo estas atingebla per mobiltelefonoj:

Brigitte Kranz (aliĝoj, loĝigo)	+49 176 4471 4714
Anne Höpken (loĝigo)	+49 176 4576 3799
Elisabeth Kuhl-Kruse (ekskursoj)	+49 170 7721 210
Stefan Krieghoff (financoj)	+49 176 5629 5129
Michaela Stegmaier (mezaĝuloj, junuloj)	+49 151 2660 1480
Franz Kruse (kunordigo, programo, interreto)	+49 171 6832 317

Nomŝildoj

Partoprenantoj ricevas nomŝildon kun sia nomo kaj aliaj informoj. Bonvolu ĉiam porti la nomŝildon! Ĝi estas via pruvilo pri aliĝo kaj manĝoj.

Loĝado en la junulargastejo

Por partoprenantoj loĝantaj en la junulargastejo la ĉambroj estas disponeblaj ekde 15:00 vendrede (2023-05-26) ĝis 10:00 lunde (2023-05-29) por anoj de la ĉefkongreso, ĝis 10:00 vendrede (2023-06-02) por anoj de la postkongreso. Bonvolu nepre forlasi vian ĉambron ĝustatempe, poste la ŝlosilkartoj ne plu funkcios. La ŝlosilkarton vi nepre devas redoni antaŭ via forveturo – alikaze vi pagos la altan koston de la karto.

Atentu: Bonvolu ĉiam ŝlosi vian ĉambropordon per la ŝlosilkarto kiam vi forlasas la ĉambron!

Manĝoj en la junulargastejo

Partoprenantoj loĝantaj en la junulargastejo havas tri manĝojn tage, kiuj okazas en la manĝejo de la junulargastejo en domo B. Partoprenantoj loĝantaj ekster la junulargastejo, kiuj antaŭmendis tag- kaj vespermanĝojn, same manĝas ĉi tie. La unua manĝo estas la vespermanĝo vendrede, la lasta estas la tagmanĝo lunde (ĉefa kongreso) aŭ vendrede (kompleta kongreso). Sur via nomŝildo estas legeble, ĉu viaj manĝoj estas antaŭmenditaj aŭ ne.

Manĝotempoj

07:30–09:30	matenmanĝo
12:00–13:00	tagmanĝo
18:00–19:00	vespermanĝo

Dum la postkongreso okazas du tuttagaj ekskursoj. La partoprenantoj de tiuj ekskursoj povas dum la matinmanĝo prepari lunĉpakaĵon por kunporti.

Salonoj

La salonoj en la junulargastejo troviĝas ĉefe en la teretaĝoj de domoj A kaj B. Detaloj estas troveblaj en la apuda domskizo.

Restadejo/renkontejo

La vestiblo kaj la najbara saloneto Heinrich II servas kiel loko por ripozi kaj restadi inter kaj post la diversaj programoj. La domo estas ŝlosita ekde 21:00, sed loĝantoj de la junulargastejo povas ĉiam ajn eniri per sia ĉambrokarto. Trinkajoj kaj iom da manĝetaĵoj estas disponeblaj.

Libroservo

Dum la ĉefkongreso, do dum la pentekostaj tagoj, funkcias la libroservo de Wolfgang Schwanzer. Ĝi lokiĝas en la saloneto Heinrich I, tuj apud la junulargasteja giĉeto kaj la restadejo.

Kongresa oficejo

En la kongresa oficejo vi povas aliĝi al la urbogvidadoj kaj al la ekskursoj, pagi la kostojn, ricevi informojn ktp. Ĝi situas en la unua etaĝo de domo A en la ĉambro A 1.13 kaj funkcias dum la sube indikitaj laborhoroj.

vendrede	sabate	lunde	marde	vendrede
(2023-05-26)	(2023-05-27)	(2023-05-29):	(2023-05-30)	(2023-06-02):
en la vestiblo:	kaj dimanĉe	8:00–10:30 (i.a.	ĝis ĵaŭde	8:00–10:30 (i.a.
ekde 15:00	(2023-05-28):	por la redonado	(2023-06-01):	por la redonado
	08:00–09:00	de la ŝlosilkartoj)	08:00–09:00	de la ŝlosilkartoj)
	12:45–13:30	12:45–13:30	18:45–19:30	
	18:45–19:30	18:45–19:30		


Kongresejoj

Kelkaj programoj, i.a. la malferma kunveno kaj la vespera kultura programo, okazas aŭ en la Altstadttrathaus (malnova urbodomo) aŭ en la Funke Medienhaus aŭ en/apud la Schlossmuseum (kastela muzeo). La piedaj vojoj de la junulargastejo al tiuj aliaj kongresejoj estas priskribitaj en

- ▶ www.esperanto.de/gek2023-vojo-malfermo
- ▶ www.esperanto.de/gek2023-vojo-festivalo
- ▶ www.esperanto.de/gek2023-vojo-kulturo

kaj en la interaga mapo

- ▶ <http://www.esperanto.de/gek2023-mapo>



Al ĉiuj eventoj en la ejoj ekster la junulargastejo okazas gvidata promeno ekde la junulargastejo. Ekiro estas 30 minutojn antaŭ la komenco de la eventoj.



Eliri la militon: esperantistaj voĉoj en post-milita Germanio **Heraus aus dem Krieg: Stimmen von Esperanto-Sprechern im Nachkriegs-Deutschland**

Pascal Dubourg Glatigny



En la tuj postmilita periodo estas preskaŭ neeble publike paroli pri estinta rezistado al naziismo en Germanio. Ankaŭ eksterlande la temo estas apenaŭ aŭdebla. Des pli interesa kaj eskternorma estas la iniciato de du esperantistoj kiuj klopodis diskonigi sian historion kaj sperton al la mondo. La socialisto Hermann Wagner (1904–?) kaj la komunisto Hermann Theobald (1892–1972), du laboristoj persekutitaj de Nazi-reĝimo, sentis en la jaroj 1947–1948 la neceson esprimiĝi antaŭ la monda esperantistaro. Ili kolektis informojn pri la kontrolo de germana socio, pri la internaj reprezalioj, pri la kontaktoj kun eksterlando, pri ies iniciatoj rezisti la nazi-diktaturon. En postmilita mondo ili volis kontraŭstari la facilan ideon, ke en la agresinta lando ĉiuj aprobis la barbaran imperiismon.

Pascal Dubourg Glatigny estas CNRS-profesoro (Franca nacia esplorcentro) ĉe la Altlernejo pri Sociaj Sciencoj en Parizo. Li aktuale direktas la ciferecan publikigadon de la arkivaĵo de Lucien Péraire pri la bicikla mondvojaĝo de tiu laboristo esperantisto (1928–1932) kaj kunordigas la retejon militrakonto pri Esperantistoj ĉirkaŭ la Dua Mondmilito (► <https://mondmilito.hypotheses.org>) kaj la bibliografion pri esperanto-historio (► <https://ha.larchives-ouvertes.fr/ESPERANTO-HISTORIO>).



Interkultura komunikado en Esperanto **Interkulturelle Kommunikation in Esperanto**

Ilona Koutny



La aŭtoro prezentas larĝan aliron al kulturo de eksteraj kaj ĝis internaj elementoj, de simboloj kaj kutimoj tra artoj kaj iliaj perantoj ĝis la pensmaniero. Ŝi difinas faktorojn de interkultura komunikado kaj de interkultura kompetento, fokusiĝas al la lingva flanko kiu povas kontribui al la (ne)sukcesa komunikado, sed ne preterlasas la kulturajn diferencojn kiuj karakterizas ankaŭ Esperanton kaj povas kaŭzi problemojn.

Diversaj situacioj estas analizataj el lingvistika, psikologia kaj sociologia aspektoj: 1) kiam denaska parolanto interkomunikas kun nendenaska parolanto de tiu lingvo; 2) la rolon de **komununa** nendenaska lingvo plenumata per la angla kiel lingvafrankao (ELF) por alveni al 3) la alternativa lingvo Esperanto, kreita por interkultura komunikado. Ĝiaj ecoj – neŭtraleco, fleksebleco, trarivebleco, kultura inkluziveco – estas analizataj, kiel ili helpas la egalrajtan komunikadon.

Esperanto kaj la angla por nuntempaj esperantologoj kadre de universitataj studoj



Esperanto und Englisch für heutige Esperantologen im Rahmen universitärer Studien

Ilona Koutny

La angla kaj Esperanto ofte estas prezentataj kiel kontraŭuloj. Ĉu ili povas tamen kune disponigi sciojn kaj kapablojn bezonatajn en la nuntempa labormerkato por junuloj? La prelego komparas la rolon de la du lingvoj en diversaj terenoj, esploras ilian lingvan, kulturen kaj psikan flankojn en la internacia kaj interkultura komunikado. Surbaze de tio estas fonditaj en 2022 la unikaj magistrataj studoj pri interlingvistiko en AMU (Adam Mickiewicz Universitato, en Poznań, Pollando)

kadre de la studdirekto pri lingvistiko kaj informmastrumado por internacia studentaro. Jen la unuaj spertoj.

Ilona Koutny naskiĝis kaj edukiĝis en Hungario, studis kaj instruis dum jardeko en la Esperantofako de Eötvös-Universitato (HU). Ekde 1997 vivas en Pollando kie ŝi gvidas la hungarologian katedron en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (AMU, PL) kiel profesoro kaj fondis la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn antaŭ 25 jaroj. En 2022 sukcesis startigi ankaŭ la surlokajn magistrajn studojn en kombino kun informmastrumado en la angla por internacia studentaro.

Esplorterenoj: post komputa lingvistiko (parolsintezo), internacia kaj interkultura komunikado, lingvo kaj kulturo, esperanta gramatiko kaj leksikografio (pretigis kelkajn vortarojn). Estis membro de AdE kaj profesoro de AIS.

ikoutny@amu.edu.pl; ► <http://www.amu.edu.pl/~inter/>

Reta prelego | Virtueller Vortrag



Ni ja ne atendis vidi teruraĵojn pri kiuj oni tiom parolis

Wir erwarteten ja nicht, Gräuël zu sehen, über die so viel gesprochen wurde

Ziko van Dijk

Germanaj kongresoj kutime havas internaciajn gastojn, kaj internaciaj kongresoj kutime havas germanajn kongresanojn. Foje la lokaj kondiĉoj ne estas idealaj, foje la internaciaj. Ĉu oni povas organizi „normalan“ kongreson en „nenormala“ politika situacio? La prelego ririgardas al Universalaj Kongresoj en Germanio kaj la kvereloj parte movadaj, parte pli seriozaj.

Ziko van Dijk estas germana esperantisto de 1988 kaj laboris por Universala Esperanto-Asocio kiel arkivisto. La historiisto vivas de longa tempo en Nederlando kaj okupiĝas interalie pri lingvistiko kaj disvastigo de scio.

Publika evento | Öffentliche Veranstaltung



Der Landesherr lässt zum Esperanto-Vortrag bitten

La landa reganto invitas al Esperanto-prelego

Roland Schnell

Im Januar 1911 wurden die Honoratioren des Herzogtums Braunschweig zu einem Vortrag über Esperanto gebeten. Der Herzog Johann Albrecht zu Mecklenburg hatte hohe Beamte, Militärs und Vertreter von Schulen ins Schloss eingeladen, wo sie nicht nur einen Vortrag von Dr. Ernst Kliemke, Direktor der Ostafrikanischen Eisenbahn anhören, sondern auch über Erfahrungen mit Esperanto in Braunschweig berichten konnten. In der Drogisten-Akademie hatte der Gründer Eduard Freise schon 1905 Esperanto-Kurse eingerichtet. Kliemke war wegen verschiedener Veröffentlichungen in deutscher Sprache zum Nutzen von Esperanto, etwa für den Kaufmann, bekannt, wobei er Erfahrungen aus seinem Berufsleben einfließen ließ.

Die Veranstaltung beim GEK findet in dem wiederaufgebauten Teil des historischen Schlosses statt, wo das Schlossmuseum einen Eindruck vermittelt, wie es Kliemke erlebt haben mochte, als er bei Herzog Johann Albrecht und seiner Gattin Elisabeth zu Stolberg-Roßla zum Abendessen geladen war. Auf speziellen Wunsch der Herzogin wurde nach den vielen Sachinformationen auch ein Gedicht „Mir träumte von einem Königskind“ von Heinrich Heine in der Übersetzung von Ludwig Zamenhof vorgetragen. Die Veranstaltung 2023 orientiert sich am historischen Ablauf.

Roland Schnell Jahrgang 1953, hat Esperanto noch als Schüler durch das legendäre „Esperanto programita“ gelernt und war in den 1970er Jahren aktiv bei der inhaltlichen Gestaltung des Internacia Seminario“ und anderer Jugendtreffen. Nach dem Umzug nach Berlin kümmerte er sich um die Werbung für Esperanto in der „Villa Kreuzberg“ und die 1990 anstehende Zusammenführung der Esperanto-Verbände in Ost und West. Berufliche Belastungen bedingten einen Rückzug aus der aktiven Esperanto-Arbeit. Seit einigen Jahren ist er im Vorstand der Esperanto-Liga Berlin-Brandenburg e.V. und kümmerte sich um den Internet-Auftritt.



Esperanta aranejaĵo – la sistemo ĝemelurba laŭ la ekzemplo de Darmstadt – eblecoj por aktivecoj de lokaj grupoj



Esperanto-Spinnennetz – das Partnerstadt-System

nach dem Beispiel Darmstadt – Möglichkeiten für Aktivitäten örtlicher Gruppen

Detlef Haußner

Post la dua mondmilito multaj komunumoj serĉis t.n. ĝemelurbojn por certigi la novan pacon per amikeco inter la enloĝantoj.

Darmstadt situas en centra Germanio kaj pro multaj eksteraj rilatoj havas 16 ĝemelurbojn.

En la jaro 1983 la nederlanda komunumo en la ĝemelurbo Alkmaar vokis por revivigi la rilatojn, kaj ekde tiam esperantistoj havis bonegajn amikajn rilatojn al geesperantistoj en la ĝemelurboj kaj per oftaj renkontiĝoj inter la ĝemelurba triangulo Alkmaar-Darmstadt-Troyes ili persone ligiĝis. Intertempe pligrandiĝis tiu araneretsimila sistemo kaj ankaŭ boĝemelurboj aldoniĝis al tiu familio de esperantistoj.

Kvankam nia kvinopo estas ŝajne malgrava kaj malgranda grupo en nia urbo ni tamen multe reklamas. Neniu alia grupo en la urbo provizas pli multajn kontaktojn al aliaj ĝemelurboj ol ni – dank’ al nia komuna lingvo. Dum kongresoj ni provas renkontiĝi kaj ni feliĉe ankaŭ ne suferis dum la epidemio, ĉar ni regule kunvenas ĉiun semajnon en familia rondo per novaj komunikiloj.

Enrigardu en la vivon de ĝemelurba movado laŭ la Darmstadta ekzemplo.

Detlef Haußner – Mi naskiĝis 1958 en Darmstadt/Germanio kaj eklernis E-on kiam mi havis 16 jarojn. Mia unua Esperanto-renkontiĝo okazis en Marina di Massa, kaj de tiu tempo mi daŭre membris en Germana Esperanto-Asocio. Mi studis geografion kaj biologion por iĝi instruisto sed ne sukcesis atingi postenojn. Trovinte laboron en Stuttgart kiel oficisto kaj post la reveno al Darmstadt mi fariĝis sociallaboristo.

Jam dum la studado komenciĝis la aktivecoj pri ĝemeliĝoj. 1983 niaj nederlandaj geamikoj ekvekis nin kaj ekde tiu tempo mi kaj mia edzino multe ĝuis tiun movadon per interŝanĝoj kun niaj ĝemelurbaj geamikoj. Intertempe ni vizitis sep diversajn ĝemelurbojn kaj kontaktis aŭ renkontis geamikojn el plimultaj aliaj. Kiam ni partoprenas UK-on ni regule organizas aperitivan por niaj geamikoj.



Amikeco inter varvagonoj (?)



Freundschaft zwischen Güterwagen (?)

Guido Brandenburg

Koncedite – dum mi mem ankoraŭ hezitas paroli pri sociaj ligoj inter transportrimedoj, la reklamo-sekcio de la Germana Fervojo evidente ne havas skrupolojn kaj ofertas grupon de ok pli-malpli serioze rigardantaj traktveturiloj kiel „la malgrandan ICE kaj liajn amikojn“ (por pli ol tri-jaruloj, kontraŭ 35,30 €). Do kial sub la titolo „amikoj tutmonde“ ne raportu al fervojamikoj pri la enkonduko de nova interliga sistemo por varvagonoj?

Kiam el ĉaroj fariĝis vagonoj kaj ilin tiris ne plu ĉevaloj sed pli fortaj vapormaŝinoj, ja necesis ilin iel kupli por formi trajnkompleton. Post elprovo de diversaj malavantaĝaj solvoj meze de la

19-a jarcento la fervojoj enkondukis la ŝrauban kuplilon el hoko kaj ŝeklo laŭlonge reguleblan per ŝraŭbo. Ĝi estas normita kaj ĉe varvagonoj ĝis hodiaŭ ankoraŭ preskaŭ senŝanĝe vaste aplikata en Eŭropo.

La klopodoj ripete fiaskis, anstataŭigi tiun nun pli ol 170 jarojn aĝan rimedon por kompili trajnkompleton per io pli eleganta, malpli temporaba kaj ne tiel postulema al homa forto: tro kosta, tro longdaŭra, tro ambicia.

Nun la plano fine realiĝu kaj helpu al la fervojo en la konkuro kun la surstrata vartrafiko. Ĝis 2030 la fervojoj en Eŭropa Unio kaj la fervoja industrio volas ekipi 450.000 varvagonojn per aŭtomata kuplilo, kiu ne nur simple kunigas la vagonojn, sed solvante tutan faskon da problemoj efektive revolucios la fervojan vartrafikon.

Guido Brandenburg naskiĝis en esperantista kaj fervojista familio kaj mem laboris kiel inĝeniero pri sekuriga tekniko ĉe la Germana Fervojo. Ekde 2014 li aktivas en diversaj funkcioj en nacia kaj internacia organizoj de Esperanto-fervojistoj.



Kiel kreskigi Esperantujon per Eventa Servo

Wie Eventa Servo die Esperanto-Welt vergrößert

Yves Nevelsteen

Eventa Servo de UEA [► <https://eventaservo.org>] estas reta evento-diskoniga servo, kreita de Fernando Ŝajani en la jaro 2017. Yves Nevelsteen estas 'ĉef-helpanto' de la projekto. Li klarigos per ekzemploj el praktiko, kiel Eventa Servo povas konkrete kontribui al la kresko de (ne nur reta!) Esperantujo.

Post ĝenerala prezento pri la projekto, kaj depende de interesiĝo, Yves en eta grupo aŭ indvidue klarigos kaj montros

- kiel utiligi Eventan Servon por via loka grupo aŭ organizo – ekzemple por afiŝi ĉiam-aktualajn informojn pri eventoj kaj kunvenoj sur via retejo;
- kiel Eventa Servo povas helpi vin por plani eventojn, ilin organizi aŭ ricevi retpoŝtajn memorigojn.

Por ŝpari tempon, eventuale hejme jam registriĝu en la retejo [► <https://eventaservo.org/r>]. Jen instrukcia filmeto, kiel fari tion: ► <https://mallonge.net/es1>

T7: Trejnado kaj asistado pri la uzado de Eventa Servo

Training und Unterstützung bei der Nutzung von Eventa Servo

Yves Nevelsteen – vidu sub *Trejnado*

Vikipedio, pli ol enciklopedio

Die Esperanto-Wikipedia, mehr als eine Enzyklopädie

Yves Nevelsteen

La reta enciklopedio Vikipedio estas la plej konata projekto de Fondaĵo Vikimedia (angle: Wikimedia Foundation), sed nepre ne la sola. Yves Nevelsteen prezentos dum GEK en ne-teknika maniero kelkajn malpli konatajn flankojn de Vikipedio kaj Vikimedia. Yves rakontos pri la asocio Esperanto kaj libera scio (Wikimedia EO) – kiu lastatempe iĝis oficiala faka asocio de UEA – kaj donos superrigardon de kelkaj konindaj vikimediaj projektoj: Vikimedia Komunejo, Vikivortaro, Vikicitaro, Vikifontaro kaj Vikivojaĝo. Li parolos pri la uzado de fotoj, kaj li klarigos kiel uzi Vikipedion kiel referencverkon per eksteraj ligiloj al artikoloj, podkasto kaj filmetoj.

Depende de interesiĝo, okazos dum GEK grupa aŭ indvidua trejnado pri Vikipedio. Se vi interesiĝas pri tio, prefere anticipe tion sciigu. Organizantoj tiam antaŭvidos tempon en la programo.



Yves Nivelsteen (1974-BE) estas tradukisto, eldonisto kaj volontulo ĉe Flandra Esperanto-Ligo kaj Esperanto Valonio. Yves flue parolas la nederlandan, la francan, la anglan kaj iom la germanan. Esperanton li eklernis en 1989. Li estas iama prezidanto de Flandra Esperanto-Junularo (2004–2007), estrarano de E@I (2007–2009) kaj verkinto de plurlingva vortaro pri komputilaj vortoj (Komputeke), manlibroj pri Vikipedio kaj diversaj praktikaj broŝuroj pri komputilaĵoj. Li kunorganizis diversajn renkontiĝojn, kiel Luminesk' 2019/2020 kaj la Beneluksan Kongreson. Yves instruas Esperanton al progresantoj en Benelukso, gvidas plurajn paroligajn rondojn kaj organizas trejnadon por instigi aktivulojn pli bone komuniki kaj pli efike uzi komputilon kaj interretan. Ekde 2018 li estas ankaŭ unu de la instruistoj dum la Studosemajnfino en Nederlando. Por Eldonejo Libera li estas provleganto. Por Flandra Esperanto-Ligo li interalie helpas pri la libro-servo kaj enpaĝigas revuojn kaj librojn. En 2019 li kreis fonduson Instigo ► <https://instigo.be>) kiu subtenas Esperanto-agantojn, kiuj provizas retajn servojn en Esperanto.



La serĉo de eksterteraj vivo kaj inteligenteco

Die Suche nach außerirdischem Leben und außerirdischer Intelligenz

(parto de SUS-39)

Amri Wandel



En la lasta jardeko tiu temo, kiu foje estis konsiderata rande de sciencfikcio, impone progresis. En 3-prelega kurso ni aŭdos pri kiel la nova spacteleskopo James Webb povos trovi signojn de vivo sur eksterplanedoj en foraj sunsistemoj, pri la mistera objekto Oumuamua kiu spronis hipotezojn pri fremdaj spacŝipoj, pri centoj da NIAFoj (Ne Identigitaj Aeraj Fenomenoj, antaŭe nomataj NIFOj) menciitaj en la novaj raportoj de la usona registaro, pri la nova projekto COSMOS kadre de la Serĉado de Eksterteraj Inteligentaj signaloj (SETI), la 70-jara Paradoxo de Fermi, „kie estas la ekstertranoj?“ pri kiu mia lastatempa esploro furoras en la amaskomunikado (ekzemple ► <https://www.hna.de/wissen/ausserirdische-kontakt-erde-kommunikation-aliens-kein-zeichen-intelligenz-radio-astrophysik-neue-theorie-zr-92012092.html>).

Okazos 3 prelegoj pri la kadra temo:

- La serĉo de kemiaj vivsignoj en eksterplanedoj
- SETI: la serĉo de radiosignaloj de aliaj civilizacioj
- La mistera objekto Oumuamua, NIFOj kaj la Fermi-Paradoxo

Amri Wandel estas profesoro pri astrofiziko en la Universitato de Jerusalemo. Esploras astrobiologion, nigrajn truojn kaj aktivajn galaksiojn. Prezidanto de la Israela societo por Astrobiologio kaj membro de la Internacia Astronomia Unio.

En Esperantujo li estas UEA-estrarano pri Scienca kaj Faka Agado, prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj kaj membro de la Akademio de Esperanto. Iama prezidanto de TEJO kaj de Esperanto-ligo en Israelo. Verkinto de la libroj „La Kosmo kaj Ni“ (en E-o) kaj „Astrofiziko kaj vivo en la universo“ (en la hebrea).



Trovi amikojn en la tuta mondo – Rememoroj el 40 jaroj da laboro por Esperanto

Freunde in der ganzen Welt finden – Erinnerungen aus 40 Jahren Arbeit für Esperanto

Jürgen Wulff



Komisiito kaj estrarano de Germana Esperanto-Junularo, organizanto de junular-interŝanĝo, fondinto de komputila klubo, estrarano kaj prezidanto de Esperanto Hamburg, tradukanto de ŝlagrotekstoj, aŭtoro. Jürgen Wulff havis kaj havas multajn rolojn en la Esperanto-mondo. Dum la prelego li raportas pri la plej belaj rememoroj, kulminoj kaj kuriozaĵoj.

Jürgen Wulff laboras kiel konsultisto por firmaoj kaj la publika administrado. Krome li estas universitata docento kaj aŭtoro. Li vivas en Hamburgo kaj estas prezidanto de Esperanto Hamburg.



Radio Havano Kubo en Esperanto

Radio Havanna Kuba in Esperanto

Ariadna García Gutiérrez



Radioelsendoj estas komunikiloj, kiuj ebligas ne nur informi sed ankaŭ transdoni emociojn pere de la parolmaniero, voĉtono kaj enhavo de la komunika mesaĝo de la parolanto.

Uzeblas esprimoj por senti sin pli proksimaj al la geaŭskultantoj. Tiuj estas gravaj aspektoj por kompreni radioelsendojn ne nur kiel ilojn, sed ankaŭ kiel vastan projekton kiu devas iĝi tuttempa, pli efika, utila, valora kaj aprezata de tiuj por kiuj ni laboras.

Tio, kaj pli, estas Radio Havano Kubo en Esperanto por la esperanta kuba teamo; ekde sia fondiĝo en 1988 Radio Havano klopodas ne nur esti la voĉo de Kubo al la mondo, sed ankaŭ pere de Esperanto ĝi celas esti la kuba voĉo pri la nacia kaj internacia movado kaj pri niaj plej gravaj atingoj.

Pri la radioelsendo, la teamo kaj la interkulturaj valoroj, kiujn ni videbligas pere de la traduka kaj komunika laboro, temos nia prezento.

Ariadna García Gutiérrez – Parolistino de Radio Havano Kubo en Esperanto

Mi ege amas komunikadon kaj instruadon de lingvo. Estas tre interese interŝanĝi kun homoj el plej diversaj mondopartoj danke al Esperanto kaj lerni tiom multe pri interkulturo kaj internacieco.



Esperanto la maltaŭga pontlingvo – prelego kun posta diskuto

Esperanto die untaugliche Brückensprache – Vortrag mit anschließender Diskussion

Konrad Gramelspacher



La ideo pri pontlingvo estas malnova ideo. Unu lingvo inter du lingvoj, kiu helpas traduki de unu al alia lingvo, se oni ne rekte povas traduki. Interese estas, ke la esperantista movado ne faras oferton per tiu ideo. Oni ne havas proprajn tradukkonkursojn, sed petas pri ŝtataj tradukeblecoj. Oficiale oni uzas en la eŭropa parlamento ofte la anglan kiel pontlingvon, se mankas rekta ebleco.



Ist Englisch und Esperanto besser als Nur-Englisch?

Ein wenig Realismus zum Englischen und die Korrektur einiger falscher Gerüchte zu Esperanto

Ĉu la angla kaj Esperanto pli bona ol nur la angla?

Iom da realismo pri la angla kaj korekto de kelkaj falsaj mitoj pri Esperanto

Lu Wunsch-Rolshoven



Die Zahl der Englisch-Sprecher auf der Welt (Muttersprachler und Fremdsprachler zusammen) ist in den letzten Jahren noch ein wenig gewachsen. Dennoch beginnt laut Fachliteratur der Prozentsatz der Englisch-Sprecher der Welt bei etwa 30 % zu stagnieren, weil die Verbreitung des Englischen nun langsamer zunimmt als die Weltbevölkerung. In Ländern mit germanischen Sprachen, die dem Englischen eng verwandt sind, sprechen viele Menschen Englisch (z.B. Niederlande 90 %, Deutschland 56 %); in den ähnlich hochindustrialisierten Ländern Italien und Japan liegen die Erhebungen und Schätzungen jedoch nur bei etwa 34 % bzw. 15 %. Hier sind also 66 % bzw. sogar 85 % der Bevölkerung von internationaler Kommunikation auf Englisch ausgeschlossen; dieser Ausschluss betrifft insbesondere Personen mit geringerem Zugang zu Bildung. Die niedrigen Sprecherzahlen in vielen Ländern scheinen unter anderem daran zu liegen, dass Englisch für Sprecher der Landessprachen sehr aufwändig ist – für Japaner werden Zahlen von 4000 bis 5000 Lernstunden genannt (statt etwa 1000 bis 1500 für Deutsche).

Esperanto lässt sich dank seiner einfachen und regelmäßigen Struktur in ungefähr einem Viertel der Zeit lernen, die für Englisch notwendig ist; es kann daher das Tor zu internationaler Kommunikation auch dort öffnen helfen, wo das Englische erfolglos war und voraussichtlich auch weiterhin scheitern wird. Dazu ist es sehr hilfreich, wenn einige unzutreffende Gerüchte, die leider sogar innerhalb der Sprachwissenschaft verbreitet sind, allmählich dank Betrachtung der Wirklichkeit und der Fachliteratur zu Esperanto verschwinden. Zutreffend ist jedenfalls das Folgende: Esperanto ist seit über hundert Jahren auch Muttersprache und hat heute nach Schätzungen 1000 bis 3000 Muttersprachlerinnen und Muttersprachler. Jährlich erscheinen etwa 120 Bücher in Esperanto; die gesamte bisher erschienene Literatur wird auf etwa 10.000 Werke geschätzt. Zur Kultur der Esperanto-Sprachgemeinschaft gehören auch mehrere tausend Lieder in Esperanto, von denen viele im Internet zu finden sind. Esperanto hat Kinderlieder, Gedichte, Flüche, Witze, Redensarten und Wortspiele. Die Sprache Esperanto unterliegt sehr wohl einem steten Wandel und einer Anpassung an die sich verändernde Welt, durch hinzukommende Wörter und gelegentlich durch neue grammatische Konstruktionen. Polen und Kroatien haben Esperanto als Kulturerbe bzw. Kulturgut anerkannt, in Ungarn ist es in vielen Bereichen gleichberechtigte Fremdsprache.

Neben der weit rascheren Erlernbarkeit hat Esperanto auch den Vorteil, dass die Literatur deutlich internationaler ist als die des Englischen und damit die Kulturen der Welt gleichberechtigter repräsentiert werden.

Lu Wunsch-Rolshoven ist Pressesprecher des Deutschen Esperanto-Bundes und Vorsitzender des Vereins EsperantoLand. Unter anderem hat er „Zum Bild des Esperanto aus der Sicht einiger Sprachwissenschaftler“ veröffentlicht, ► <https://www.researchgate.net/profile/Louis-Wunsch-Rolshoven>. Lu Wunsch-Rolshoven hat Mathematik mit dem Nebenfach Sprachwissenschaft studiert. Mehr in der Esperanto-Wikipedia, ► https://eo.wikipedia.org/wiki/Lu_Wunsch-Rolshoven.



Trajnovaĝo al la 107-a UK en Montréal

Zugfahrt zum 107. Esperanto-Weltkongress in Montréal



André Christian Weber

Pasintsomere mi sukcesis, kombini kvar belajn kaj interesajn eventojn en unu vojaĝo.

Unue mi vizitis la urbon Vancouver en la sudokcidento de Kanado. Tie mi interalie biciklis ĉirkaŭ la parko „Stanley Park“, uzis la pramŝipetojn „Aquabus“ kaj migris en la valo „Lynn Canyon Park“. Krome mi uzis la senŝoforan metroon „Skytrain“ kaj la transhavenan pramŝipon „Seabus“.

Lunde tagmeze, post adiaŭa tagmanĝo en la turniĝanta restoracio de la televida turo „Vancouver Lookout“, mi eniris la faman, transkontinentan trajnon „The Canadian“. Per ĝi mi dum kvar tagoj kaj noktoj ĝuis la belan pejzaĝon kaj trifoje ĉiutage tre bongustajn pladojn en la restoracio-vagono. Kaj la plej bona sperto estis la tre interesaj babiladoj kun tre diversaj homoj. Multaj el ili la unuan fojon aŭdis pri Esperanto kaj montris ioman intereson. La plej granda kaj ĝojiga surprizo estis, ke mi en la trajno renkontis sinjoron Namba el Yokohama (Japanio), kiu ankaŭ vojaĝis al la UK.

La Universala Kongreso en Montreal ofertis al ni – kiel kutimas – abundan, varian kaj plenshopitan programon. Dum piedmarŝo tra la apudhavena urbocentro mi aŭdis multajn informojn pri la historio de la urbo kaj dum alia duontaga ekskurso mi lernis multon pri metrooj. Ĉiuvespere okazis kultura programo. La teatraĵo „1910“ kaj diversaj dancprezentaĵoj tre plaĉis al mi.

Ĉion tion kaj multajn pluajn faktojn, impresojn kaj fotojn mi prezentos dum mia lumbild-prelego.

André Christian Weber loĝas en la urbo Ŝverin (germane: „Schwerin“) en la nordoriento de Germanio. Dum pli ol 25 jaroj li laboris en ŝtata oficejo pri laborloka sanprotekto. Tie li, kiel diplomita kemiisto, ĉefe okupiĝis pri la korekta uzado de danĝeraj substancoj ĉe diversaj laborlokoj. Nun li estas pensiulo.

Antaŭ nelonge li fariĝis la estro de la Landa Asocio Meklenburgio-Antaŭpomerio (LAMA).



50 jaroj Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)

50 Jahre Bahá'í Esperanto-Liga (BEL)



Bernhard Westerhoff

Iom pri la rilatoj inter la Bahaa Kredo kaj Esperanto, pri la historio de BEL kaj pri ĝiaj aktivecoj – kun aparta atento al la ĵus de ĝi en E-traduko eldonita aŭtoritata historio de la unuaj cent jaroj (1844–1944) de la Bahaa Kredo „Dio preterpasas“.

Bernhard Westerhoff estas longjara sekretario de Bahaa Esperanto-Ligo kaj oficisto en la sekretariato de la germana bahaa komunumo.



Situacio de homaj rajtoj en Pakistano

Situation der Menschenrechte in Pakistan



Hamza Salam

La situacio de Homaj Rajtoj en Pakistano estas tre kompleksa kiel rezulto de la diverseco de la lando, granda loĝantaro, ĝia statuso kiel evolulando kaj suverena islama demokratio kun miksaĵo de islama kaj laika juro.

La Pakistana Konstitucio zorgas pri fundamentaj rajtoj. La klaŭzoj ankaŭ antaŭvidas sendependan Superan Kortumon, apartigon de ekzekutivo kaj juĝistaro, sendependan juĝistaron, sen-

dependan homrajtan komisionon kaj moviĝ-liberecon ene de la lando kaj eksterlande. Tamen ĉi tiuj klaŭzoj ne estas respektataj praktike.

Hamza Salam – Mi naskiĝis en Pakistano en 1996. Ĉar mia paĉjo estas esperatisto ekde mia infaneco mi bone konatiĝis al Esperanto. Mi studis komputilan programadon, homajn rajtojn kaj ĵurnalismojn. Mi aktiviĝas pri la homaj rajtoj. Mi jam spertis renkontiĝojn kun mondfamaj esperantistoj de nia movado kiel Hori Yasuo, d-ro Puramo Wong Chong, Bharat Kumar Ghimire, Indu Devi Thapaliya, Renato Corsetti, d-ro Luigi Fraccarolli, Peter Wraae, Kim J. Henriksen KIMO, Roman Dobrzyński kaj Mireille Grosjean, kies personecoj multege entuziasmigis min al plua studado de Esperanto kaj involviĝo al Esperanto-movado, pro kio mi estas dankema al ili ĉiam ĉiam. Revas renkonti al estimataj Ulrich Brandenburg, d-ro Duncan Charters, doktorino Katalin Kováts kaj Zsófia Kóródy. Nun mi estas lerta programisto, kiu estas ĉiam preta volontuli por fari projektojn por la disvastigo de nia Esperanto.



Esperanto en Afriko kaj la Universala Kongreso en Tanzanio 2024

Esperanto in Afrika und der Esperanto-Weltkongress in Tansania 2024

John Magessa

Esperanto en Afriko estas tiel avantaĝa, ĉar ĝi faciligas komunikadon inter popoloj tra Afriko kaj Eksterafriko, kie estas multaj diversaj lingvoj.

Por la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en 2024, la Estraro de UEA unanime elektis Tanzanion kiel kongreslandon. La unuan fojon UK okazos en la kontinento Afriko. La gastiga urbo Aruŝo estas internacia turisma destino, sed ne nur: ĝi ankaŭ estas grava diplomatia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio.

La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol 2 milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la nacia parko Serengeti, la konservada areo Ngorongoro, la nacia parko Lago Manyara, la gorĝo Olduvai, la nacia parko Tarangire, la monto Kilimanĝaro kaj la monto Meru en la nacia parko Aruŝo mem.

